

Enhavo

- **anoncoj**

Seeking a translator; Retejo por aktiv(em)uloj; Novaj varoj en la retbutiko; UEA havas novan retforumon; *Kreativa*, nova albumo por rege-ŝatantoj; Korespondi deziras; NASK 2017

- **The Esperanto-USA Congress, NASK, and Amazon Smile**

de la centra oficejo - Vilĉjo Harris

This year the Annual Congress and NASK are scheduled at the same location, one right after the other. I encourage you sign up for both of them.

- **Media hits**

anoncoj

Noteworthy mentions of Esperanto in American media.

- **loke**

SuKERo en suda Kalifornio

- **Memoru**

beletre - Petro Palivoda

Poemo de Oleksandr OLES, elukrainigita de Petro PALIVODA.

- **Ankaŭ UEA vin bezonas!**

anoncoj - Filipino Dorcas

Se vi havas intereson en Esperanto kiel tutmonda movado, vi konsideru aliĝi al UEA, la Universala Esperanto-Asocio. UEA estas nia internacia organizo por Esperanto.

- **leterkesto**

La ŝika ŝildo estas ŝia, ŝajne

- **Richardson textbook back in print — and as an e-book**

libroj

Since its appearance in 1988, Esperanto-USA has published and sold the book *Esperanto: Learning and Using the International Language* by David Richardson. When it became clear that the existing stock was nearly gone, a group of members took action to update and reprint it.

- **La soifa jaĥtisto**

enigmoj - Daĉjo Rutan

Ŝiboletto grimpis en la malordan jaĥton de Malliven. En la eta kajuto li trovis la kadavron de Robeĉjo. Ĝi kuŝis surdorse.

- **Rana**

senintenca esperantaĵo?

Kiaj ravioloj? Ho, ve.

- **La sindefenda pafinto**

enigmo-solvoj

Jen la solvo de nia pasintnumera enigmo. Laŭrojn al la solvintoj!



Usona Esperantisto

Redaktoro / Editor: HOSS FIROOZANIA

Sendu kontribuojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Usona Esperantisto estas uzebla laŭ la permesilo de Krea Komunumo *cc-by-sa* [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eo>]. Kiel komplezon, ni cetere petas, ke oni atentu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia TTT-paĝaro.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons Attribution-Share Alike (cc-by-sa) license [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>]. As a courtesy, we ask that you also wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style manual on our website.

Seeking a translator

I'm looking for proficient Esperanto speakers to help translate content from English to Esperanto. This would also include helping to create an Esperanto language club that includes a *Rosetta Stone* like language program. Please email me for further inquiries. Thank you.

– Windcarver

<windcarver@protonmail.com>



Retejo por aktiv(em)uloj

Kiel plia paŝo en la renovigo de la retejoj de UEA, lanĉigas retejon aktivulo.net [http://aktivulo.net]. Tiu frukto de longa laboro fare de Dima ŜEVĈENKO kaj Anna STRIGANOVA, laŭ instigo kaj gvido de la Vicprezidanto de UEA, Stefan MACGILL, celas subteni niajn aktivulojn tutmonde per valoraj informoj kaj kontaktebloj.



Unu el la kernaj celoj estas provizi kaj enarĥivigi informojn pri la Seminarioj por Aktivula Maturiĝo. Per kolektado de la materialoj kaj rezultoj de la seminarioj, UEA celas iom post iom krei ampleksan sciobankon por diversspecaj bezonoj sur la agadkampoj Konsciigo, Kapablo, Komumuno kaj Kunordigo.

Pri la Jaro de la Lernanto, unu el la du ĉefaj fokuso de la agado de UEA por 2017, la retejo provizas per ĝisdataj informoj, inkluzive de listo de eventoj kaj konsiloj por lokaj grupoj.

Novajo estas Asocia Blog, kiu celas doni kanalon por rekta informado pri la faroj, spertoj kaj vidpunktoj de diversaj UEA-aktivuloj, inkluzive de oficistoj kaj volontuloj en la Centra Oficejo, estraranoj kaj komisiitoj. La unuan blogaĵon verkis Veronika POÓR, Ĝenerala Direktoro de UEA, kiu rakontas pri kelkaj el siaj spertoj kaj atingoj dum la unua jaro en Roterdamo.

Komence la retejo prizorgas ĉefe unudirektan

informo-donadon. Perspektive, tamen, la celo estas enkonduki teknikajn rimedojn por permesi dudirektajn dialogojn kaj faciligi la enplekton de pli vasta gamo de aktivuloj.

Novaj varoj en la retbutiko

• BELARTA RIKOLTO 2016

Texts from winners of the 2016 *Belartaj Konkursoj*.

Antonio Valén, Benoît

Philippe, Aleksandro Mitin,

Valentin Melnikov, Jesper Lykke Jacobsen,

Lenke Szász-Praid, Ewa Grochowska, Amir

Naor, Steven D. Brewer, Raffaele del Re, Rafael

Henrique Zerbetto, Jorge Camacho Córdón,

Jesus Moinhos Pardavila; also the *Report of the*

President by Humphrey Tonkin and selected

paragraphs from by Baldur Ragnarsson.

Softcover. 139 pages. 2016. USA. \$12.10.

Link [<http://bit.ly/2jXLlqY>]



• MARINA

Sten Johansson

Marina kaj Tomas: Two Swedes with different backgrounds cross paths and then separate.

Unexpected events and revelations form their relationship, until Marina disappears. István

Ertl writes: “Sten Johansson has written a

modern story about self-loss and

self-rediscovery, about Sweden from the '70s to

today, with a rich mosaic of three-dimensional

characters. ‘Marina’ is his seventh book in

Esperanto.” Softcover. 187 pages. 2013. USA.

\$18.43.

Link [<https://goo.gl/tLeHZB>]

• INTELEKTAJ AMUZOJ

Tatjana Auderskaja

Letter games, word games, text games, poetry games, and crossword puzzles in en Esperanto.

The author writes: “All of these games have been tested by the Esperanto public at various

get-togethers. We hope that these

mind-training tasks will be useful for all Esperantists, exercising their brains for fun and for the use and spread of Esperanto.” Softcover. 113 pages. 2016. USA. \$19.27. Link [<https://goo.gl/4VbL02>]

Mendu de *Esperanto-USA*, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, aŭ rete [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>].

UEA havas novan retforumon

La Estraro de UEA, klopodante igi la asocion pli demokratia, lanĉis novan retforumon

[<http://forumo.esperanto.net/>]. Ĝi estas la oficiala kunlaborejo de UEA, kie ĉiu esperantisto havos oportunon labori proksime de la Estraro, kaj la Estraro havos oportunon koni novajn agadproponojn.



Por la estraranoj, komisiitoj kaj oficistoj de UEA, estas tre malfacile partopreni diskutojn tra pluraj grupoj en la reto, kaj de tio rezultas manko de respondoj kaj agoj.

La forumo ne celas anstataŭi diskutojn en aliaj lokoj; efektive UEA preferas, ke tiuj daŭre ekzistu, kaj ke la membroj diskutu pri diversaj temoj tie. UEA provas nur krei manieron por ke, post la maturiĝo de tiuj diskutoj, oni afiŝu la konkludon, eĉ kun pluraj vidpunktoj, en unu sola loko. Tiel oni havos gravajn informojn ĉiam facile retroveblajn.

Kreativa, nova albumo por rege-ŝatantoj

La Esperanta rege-kantisto Jonny M kontaktis la redakcion por anonci sian novan albumon *Kreativa*, kiu aperis en Januaro.

La verko estas efektive duobla albumo, kiu enhavas ne nur dek kvar freŝnovajn kantojn, sed ankaŭ dokumentojn pri la albumo, muzikvideojn kaj plu en DVD. Por tiu ĉi albumo Jonny kunlaboris kun La Perdita Generacio, Dolchamar kaj jOmO.



Por pli da informo, vidu jonny-m.org [<https://jonny-m.org/>].

Korespondi deziras

Se vi interesiĝas pri korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al Koresponda Servo de Japania Esperanto-Instituto. Skribante al ni korespondo-peton, por faciligi nian laboron bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn. **Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tokio, 162-0042 Japanujo**



NASK 2017

NASK 2017 revenos al Universitato William Peace en Raleigh, Norda Karolino la kvaran fojon.



Du elstaraj eksterlandaj instruistoj akceptis la inviton partopreni: Katalin KOVATS (Hungarujo/Neterlando) instruos en la Supera Nivelo, kaj ŝia edzo Sylvain LELARGE (Nederlando/Francujo) instruos en la Meza Nivelo. Ili ambaŭ instruis kiam la kursaro okazis en Brattleboro, Vermonto ĉe la Altlernejo de Internacia Trejnado (School of International Training) en 2006.

Lee MILLER kaj Thomas ALEXANDER (Usono) instruos en la Post-Baza nivelo. Ĝuste antaŭ NASK okazos la Landa Kongreso de Esperanto-USA, samloke tiel ke oni povos veni por la Kongreso kaj resti por NASK. La kongresaj datoj estos 30 Junio - 3 Julio. Studentoj por NASK alvenos la 4-an de Julio kaj foriros la 13-an; lecionoj okazos de la 5-a ĝis la 12-a.

Vespere de la alventago, studentoj povos spekti artfajraĵoj en la urbcentro. (La Universitato William Peace estas je promendistanco, kaj la artfajraĵoj estas videblaj de la kampuso).

Dum la 8 tagoj de instruado, lecionoj okazos

matene, kaj estos ankaŭ diversaj aliaj aktivaĵoj kaj programoj posttagmeze kaj vespere: prezentadoj, esplorado de la belaj muzeoj, butikoj kaj restoracioj de la urbo, ĉio en piedira distanco de la kampuso. La baza kosto por 8-taga NASK estas \$790 – loĝado, manĝado, kaj instruado. Estas aliaj eblecoj por lokanoj kiuj ne loĝos ĉe la universitato.

Petu la registrilon de <eddyellen@aol.com> aŭ vizitu la NASK-paĝaron en TTT [<http://nask.esperanto-usa.org>].

— *Ellen EDDY*

de la centra oficejo

The Esperanto-USA Congress, NASK, and Amazon Smile

Vilĉjo HARRIS

This year the Annual Congress and NASK are scheduled at the same location, one right after the other. I encourage you sign up for both of them. At our online store you can sign up for the Annual Congress [<https://goo.gl/wzcB4h>] and sign up for NASK [<https://goo.gl/QvT7K6>].

Members in the online and introductory categories do not automatically receive paper signup forms in the mail. However, if you would prefer to sign up with paper forms, send a request to <eusa@esperanto.org> or call us at 510-653-0998.

Members in the other categories will soon receive sign-up forms in the mail.

We have a web page with further information about the congress [<https://goo.gl/GGueeE>].

If you have not participated in a congress before, please see the Introduction to the E-USA Congress [<https://goo.gl/XYwcom>].

See upcoming information about NASK [<http://nask.esperanto-usa.org/venonta/>]. For more, please contact Ellen Eddy at <eddyellen@aol.com>.

For more information about the congress, please contact Chris Johnson at <cdj2981@gmail.com>.

I hope to see you at the Congress and at NASK!



If you shop at Amazon.com, you can donate money to Esperanto-USA without sending us a dime.

Just go to <http://smile.amazon.com> [<http://smile.amazon.com>], and choose Esperanto-USA as your favorite charity. Then always use this same URL when you shop at Amazon. Amazon Smile is owned by Amazon, and the shopping experience is exactly the same as with Amazon (including prices).




Vilĉjo HARRIS

Vilĉjo estas direktoro de la Centra Oficejo de Esperanto-USA en Emeryville, CA.

<eusa@esperanto-usa.org>

Richardson textbook back in print — and as an e-book



Cover art of the new edition

Since its appearance in 1988, Esperanto-USA has

published and sold the book *Esperanto: Learning and Using the International Language* by David Richardson.

When it became clear that the existing stock of the book was nearly gone, and there were no plans in place to reprint it, member Lee Miller took the initiative to organize a small group to prepare this valuable resource for a new, 4th edition.

The team has revised and edited the introductory material, made changes to the graphics in the *Textbook* and *Annotated Reader* sections, and incorporated a new table of contents and detailed index to the grammar. The book will continue to be available as the primary U.S. contribution to the small number of introductory texts available for English speakers.

In addition to Lee, the team includes Tim Westover, Ben Speakmon, Murray Merner and Chuck Mays. Tim did the majority of the work preparing the existing PDF document for reprinting. The table of contents and index were originally compiled by Murray and Chuck in Raleigh, North Carolina, and other members of the Raleigh group participated in developing the final form.

The new edition is now available at Amazon [<https://goo.gl/12ksLw>] in both electronic form (Kindle, \$2.99) and paper (\$9.00).

Ankaŭ UEA vin bezonas!

Filipo DORCAS

Se vi havas intereson en Esperanto kiel tutmonda movado, vi konsideru aliĝi al UEA, la Universala Esperanto-Asocio. UEA estas nia internacia organizo por Esperanto.



Kiel aliĝi al UEA? Kiam vi aliĝas al Esperanto-USA, vi povas aliĝi ankaŭ al UEA. Tio haveblas en nia retbutiko [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>]. Vi povas ankaŭ iri rekte al la retejo de UEA [<http://uea.org>]. Por aliĝi, klaku ĉe **Aliĝoj** kaj iru al **Membro-aliĝilo**. Tiel vi estos membro de UEA por la kalendara jaro.

Membroj de UEA ricevas la *Jarlibron* de UEA kaj la bultenon *Esperanto*, la monatan informilon de UEA. Per tiuj informiloj vi ekscios pri la agadoj de UEA, kio okazas en aliaj landoj, UNICEF, UNESCO, la Unuiĝintaj Nacioj, TEJO kaj la agadoj de la junuloj, la Centra Oficejo de UEA, fakaj agadoj, ILEI – La internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, la strategia plano de UEA, la Universala Kongreso, kaj multaj aliaj interesaj agadoj.

Kelkaj membroj de UEA en Usono estas delegitoj

por Esperanto-USA. Delegitoj reprezentas siajn urbojn aŭ regionojn al UEA. La *Jarlibro* enhavas liston de delegitoj por ĉiu lando de UEA, kune kun informo pri la delegito, kontakt-informo, fakoj, kaj aliaj detaloj. La delegitoj estas tiuj, kiuj havas intereson en la agadoj de UEA kaj la internacieco de Esperanto.

Okazos akcepta festeto por delegitoj de UEA dum la Landa Kongreso de Esperanto-USA en Raleigh, Norda Karolino, dimanĉon, la 2-an de Julio, 2017. Mi invitas ĉiun delegiton de UEA kaj ties edzon aŭ edzinon al tiu dankesprimio. Dankon al ĉiu delegito!

Se vi havas demandojn pri UEA, pri delegitoj, aŭ kiel esti delegito, nepre kontaktu min. Vin ni bezonas en nia delegita reto.



Filipo DORCAS

Filipo estas ĉefdelegito al UEA de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

<filipo@grupoj.org>

enigmo-solvoj

La sindefenda pafinto

En N^o 2016:6 aperis nia unua detektivo-enigmo. Aperis en nia redakcia poŝtkesto pluraj lertaj respondoj.

Do kiel Ŝiboleto sciis, ke Jozeĉjo ne kuris rekte al Bernĉjo? La plej bunte kreema (aŭ ĉu halucina?) respondo venis de David WOLFF:

Profesoro Ŝiboleto sciis tion, ĉar krom la truoj en la viktimo, lia maldekstra kruro estis forhakita, kaj sango-kovrita hakilo ankoraŭ estis en la mano de Bernĉjo. Tro facila!

Nu...

Pri hakilo ni scias nenion, sed ja pravus la rimarko pri la truoj. Se Jozeĉjo estus kurinta rekte al Bernĉjo, la kuglo ne estus enirinta lian kapon malantaŭ la orelo. Ĉar mensogis ankaŭ la tavernisto, Ŝiboleto hipotezis, ke ankaŭ li partoprenis en la murdo; eble li parolis kun Jozeĉjo por distri la gangsteron, kiam Bernĉjo pafis de malantaŭe.

Gratulon al Debra HAMEL kaj David WOLFF, kiuj gajnis en la lotumado. Ili ambaŭ ricevos \$5-rabaton de la libroservo. Laŭrojn al ankaŭ Debi BREWER, Erik PEDERSEN, Greĉjo FORĜISTO, Anna BENNETT, kaj Jorge Rafael NOGUERAS. Ili ĉiuj estas pretaj porti detektivajn ŝildojn.

Media hits

- On January 31st the University of California published an article on its website titled From Klingon to Dothraki: Understanding invented languages [https://goo.gl/4Sae6x], about a course on conlangs being taught by Nick Kalivoda, a Ph.D. candidate in linguistics and alumnus of NASK. Much of the article is devoted to Kalivoda's experiences with Esperanto:

UNIVERSITY
OF
CALIFORNIA

[Esperanto] is the most widely spoken constructed language in the world. [...] Kalivoda assures that once you start learning it, "you realize that it's just as capable as any natural language of expressing whatever you want to say."

Being an Esperanto speaker, or Esperantist, has come in handy for Kalivoda. When travelling in Iceland one summer he met two friendly travelers, one Italian, the other Slovak, neither of whom spoke much English. The three spoke Esperanto.

"I was able to show up in a foreign place and feel right at home."

- On February 18th the *New York Times* published a Sunday acrostic puzzle [https://goo.gl/ktev4M] that featured Esther Schor's book *Bridge of Words*. The answers to the clues produce this quotation from the book:

The
New York
Times

"Like... Doctor Frankenstein, Zamenhof took the dismembered parts of other languages and created a new being entirely. It must have been a lonely venture, being the sole speaker of a language yet to be put before the world."

After providing some history about how the language is used for fostering communication between nations, the puzzle editor mentions how the teachers at her elementary school put Esperanto to use in a rather different way:

We had not even mastered English at that point, and the thought of talking to strangers in a language that no one in my neighborhood had ever heard of was terrifying. [For the teachers, Esperanto] became a useful tool in threatening their boisterous classes: "Everyone sit down and be quiet, or we're all going to learn Esperanto!"

- On February 16th, *Boston* magazine published *When a New Language Was Popularized in Boston* [https://goo.gl/GO5MbX], about the formation of the Boston Esperanto Society in 1905. In addition to providing a brief history of the language, the article includes a plug for BRUEGo [http://www.bostonesperanto.org], the *Bostona Regiona kaj Urbega Esperanto-Grupo*, which meets monthly.

Boston

SuKERO en suda Kalifornio

IRVINE, KALIFORNIO – La 8-an de Januaro, du “kantonegoj” renkontiĝis preskaŭ meze de la Universitato de Kalifornio ĉe Irvine – en la kantono Oranĝa – por la Suda Kalifornia Esperantista Renkontiĝo (SuKERO). Renkontiĝis dekdu!

Kiam okazis la lasta tia okazaĵo? Je 2003, en la kanton(eg)o losanĝelesa! [Por tiuj, kiuj uzas la socian reton *Facebook*, la grupo de Oranĝ-kantono havas paĝon tie [<https://goo.gl/UJMy3D>]. –Red.]



Alex VAN, Benjamin' KWIECIEŃ, Bobby BROOKS, Edgardo RETANA, Ezra MONROY, Grifido, Izako MOORE, James NOWICK, John DUMAS, Jozef LANE, Kat, kaj Keneĉjo. (Dankon al James pro la foto.)

— Keneĉjo GOLDBERGO
<kenecxjo@gmail.com>

Memoru

Petro PALIVODA

Verkis Oleksandr OLES, 1931

Elukrainigis Petro PALIVODA, 2017

Dum Ukrainujo en morta batal'
La rajton de l' viv' kontraŭ bestoj defendis,
Nur volis kompaton pro sia fatal',
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainujo, lasita de Di',
La tuta plu sangis kaj plore lamentis,
Atendis ĝi helpon amikan por si,
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainujo en jugo el fer'
Servutis kaj plugis, ĝin vundoj turmentis,
Eĉ rokoj sin movis pro tiu sufer',
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainujo en sangrikoltad'
Por la torturant' sian morton jam sentis,
Eĉ vortoj mutiĝis pro nigra malsat',
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainujo la vivon sen bon'
Malbenis kaj tombon prezentis,
Eklarmis eĉ fia malica demon',
Eŭropo silentis.



Oleksandr OLES (Олександр Іванович Олесь)



Oleksandr OLES (1878-1944) estis fama ukraina poeto. Li naskiĝis en norda Ukrainujo, studis bestkuracadon en Ĥarkovo, kaj laboris en Ĥarkovo kaj Kievo. En 1907 aperis lia unua poemaro, kaj poste sekvis multaj aliaj. Post la venko de bolŝevistoj en 1919 li migris al Vieno, kie li daŭrigis sian verkadon. Li mortis en Prago, Ĉeĥoslovakujo.

La amara kaj drama refreno “Eŭropo silentis...” aperis en lia poemo *Memoru* en Aŭgusto, 1931, kiam la stalinisma epoko antaŭsignis teruran katastrofon por Ukrainujo. En 1929 komenciĝis amasa ekstermado de la intelektularo, kaj la devigita kolektivigado elradikigis kamparanojn. Tiutempe multaj ukrainoj nutris la esperon, ke Eŭropo helpos ilin. Oles tamen antaŭvidis katastrofon, kaj ja du jarojn poste sekvis la *Holodomoro* – la amasa mortmalsato kiu ekstermis milionojn da homoj.

La poemon *Memoru* elukrainigis Petro PALIVODA, ukraina kaj Esperanta poeto kaj tradukisto el Kievo.

Ieterkesto

La ŝika ŝildo estas ŝia, ŝajne

Mi rimarkas erareton en la bonega libro *Bridge of Words*. Je la sepa paĝo, la aŭtoro mencias ke Sid CULBERT havis la aŭtoŝildon *SALUTON*. Fakte, tio estas *mia* aŭtoŝildo. Schor citas artikolon de 2003 en seatla ĵurnalo, kaj fakte estis tiu verkisto kiu unue eraris.



Jen lastatempa foto de brazila esperantisto dum lia vizito al Seatlo; li faris “selfie”-foton apud la ŝildo!

Kiam li venis al la domo de Sid kaj Ruto, post la morto de Sid, por intervui Ruton, ankaŭ mi estis tie, kaj mia Honda kun *SALUTON* sidis antaŭ la domo. La verkisto supozis, sen demandi, ke la aŭto apartenas al Sid. Fakte, ni ankoraŭ havas tiun ŝildon.

— Arlyn KERR
<arlyn@morsekob.org>

Skribu al *Usona Esperantisto!*

Bonvenaj estas viaj komentoj (en la angla aŭ en Esperanto) ĉu pri Esperantujo, ĉu pri la lingvoproblemo, aŭ ĉu pri io lastatempe aperinta en *UE*. Leteroj estu prefere ne pli ol 300 vortojn longaj; anoncoj, ne pli ol 400. Sendu mesaĝojn al la redakcio.



La soifa jaĥtisto

Daĉjo RUTAN

Teodoro Malliven malforte ligis sian batitan jaĥton al la luata fiŝista ŝipeto de Profesoro Ŝiboleto. “Danku al la ĉielo, ke vi vidis min!” li diris.



Ŝiboleto kliniĝis kaj helpis la jaĥtiston treni sin en la ŝipeton.

Malliven ŝancele paŝis en la ombron de la kajuto kaj falsidiĝis sur liton. Li deprenis sian ĉapon por forviŝi ŝviton de la frunto, malkovrante kalvan, lentugan kapon.

“Jen, trinku”, diris Ŝiboleto, donante tason da akvo.

Malliven avide fortrinkis ĝin kaj petis plian. Fininte la duan tason, li ekrakontis: “Robeĉjo kaj mi velis al Bimini kiam ŝtormo trafis nin. La veloj, stirilo, kaj radioaparato detruigis ene de kvin minutoj. Ni apenaŭ sukcesis resti flosantaj.

“Kvin tagojn ni drivis, vojperдите. Antaŭ tri tagoj elĉerpiĝis nia freŝa akvo. Robeĉjo frenezigis pro soifo kaj varmego. Li komencis trinki marakvon. Mi penis teni lin. Mi batis lin. Li – li frapis sian kapon kontraŭ la triborda boatrando. Li mortis! Mi kulpas!”

Ŝiboleto grimpis en la malordan jaĥton de Malliven. En la eta kajuto li trovis la kadavron de Robeĉjo. Ĝi kuŝis surdorse. La krimsciencisto esploris blujajn kontuzojn sur lia makzelo kaj baze de lia kranio.

Ree en sia ŝipeto, li konsilis al Malliven: “Vi devas elpensi pli bonan rakonton por la polico ol tio, kion vi rakontis al mi!”

Kial Ŝiboleto ne kredis al Malliven? Ĉu vi povas diveni? Inter la solvintoj ni lotumos du premiojn. Bonvolu sendi **nur unu** solvon al la redakcio **antaŭ la 15-a de Aprilo**.

senintenca esperantaĵo?

Rana



Mmm, ravioloj... sed *kiaj*?! Terure. Eĉ pli strange, ili ŝajne odoras je pomoj...